2-10-2024

Invitilo por la kunveno de la Amsterdama Rondo en dimanĉo, la 13an de oktobro 2024, 13a horo

La **13an de oktobro 2024**, je la **13.00a** horo, ni renkontiĝos en « De Koopermoolen », Warmoesstraat 5 Amsterdam, kaj **samtempe ni ebligos kontakton per ZOOM (vidu sube).**

Karaj homoj,

La antaŭa renkontiĝo, la 10-an de septembro en la Koopermoolen ne iris ĝuste kiel dezirite. La Zoom-ligo ne funkciis, kun la rezulto, ke la Zoom-uloj ne povis partopreni per la interreto. Domaĝe, ĉar la rakonto de Marc Oostendorp estis amuza kaj interesa. La konekto funkcios en la venonta kunveno, la 13-an de oktobro.

La rakonto de Marc ankoraŭ estos sendita kune kun la bildoj.

Ni korpe ĉeestis ĉirkaŭ 10 kaj ni finis la renkontiĝon per kelkaj trinkaĵoj kaj manĝetoj, kiujn iuj el ni kunportis. Ni ĝuis kaj planas ripeti ĝin po tri monatoj. Do la venontaj momentoj estos la 10-a de decembro 2024 kaj la 9-a de marto 2025. Tamen, ĉar la 10-an de novembro koincidas kun la Studsemajnfino, ni povus ŝanĝi la daton.

Marc van Oostendorp humure prezentas por la cheestantoj.

Kion ni faru venontfoje?
Ni ŝatus kuraĝigi interparoli unu kun la alia. Ankaŭ kun la Zoom-uloj. Kiel ni povus fari tion?

Eble per mallongaj prezentoj de ekzemple 5 – 15 minutoj kun eble malgranda parolado poste. Ĉu eblus 3? Ankaŭ la partoprenantoj per Zoom facile povus fari tion. Eble pri la loka klubo, aŭ pri io kio okazas en via ĉirkaŭaĵo? Kiu volus fari tion por unu el la venontaj renkontiĝoj? Bonvolu sciigi nin ĉi tiu semajno.

Korajn salutojn,

Peter Ebenau
Peter5424@gmail.com
+316 1424 0870